Elli Weisbach,

# Rapide

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Diablo!
Ni fordiboĉas la Teron,
ni foruzaĉas por nia amuzo
la trezorojn de l' mondo.
Rendimento, plezuro kaj fortaj motoroj
ebriigas,
narkotas la menson.
Frenezo!
Ni frenezuloj!

Neniam ni estis
al la falo en senfundon
tiel proksimaj.
Kia stulteco
pelas nin
kaj ĉiujn senkonsciajn hometojn
al abismoj?

Rapide, rapide,
nur ĉiam antaŭen
nur ne paŭzi
ne pripensu
nepre ne pripensu.

. . .

Rendimento, plezuro kaj fortaj motoroj,
je diablo, kia plezuro!
Ni eraras! Kia stulteco!
Proksimas la senfundo.

Sed ne paŭzu,
rapide, rapide!
La trezoroj de l' mondo
ebriigas.
La senco?
Ne pripensu, nepre ne pripensu:
Ni disdiboĉas la Teron kaj
ĉiuj senkonsciaj hometoj
al la frenezo
kaj al ĉiuj diabloj.

*Traduko de la Germana poemo "Aber Tempo" de* ELLI WEISBACH *(Elvira Köhler) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-391-771 (2007-03-28 07:26:36)*